



*Senlime*

Groupe espérantiste de  
Verviers



La de Esperanto-grupo Verviersa

Avec le soutien de la Fédération  
Wallonie-Bruxelles

TRIMONATA INFORMILO PRI ESPERANTO EN LA VERVIERSA REGIONO

En cas de non-distribution, merci de  
renvoyer à l'éditeur responsable:

Jean-Marie Jacques,  
5 rue Joseph Wauters  
BE-4800 VERVIERS

Informations en français  
Informoj en la franca lingvo:

Tel. +32-(0)87/33.02.92

Mail: [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

Esperantista Grupo de Verviers  
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters  
BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands  
Informoj en la nederlanda:

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: [parren@senlime.org](mailto:parren@senlime.org)

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16  
NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch  
Informoj en la germana:

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: [hogen@senlime.org](mailto:hogen@senlime.org)

K. Hogen, Auf der Pief 22  
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro  
kaj rete elŝuteblas ĉe  
[www.senlime.org](http://www.senlime.org)**

**Prezoj por BE, NL kaj DE:  
Unuopa n-ro : 4 EUR  
Jara abono : 12 EUR**

Abono al **papera** versio de nia  
informilo (12 €) eblas sed **NE** en-  
havas la kotizon al **Senlime** (10 €).

Bonvolu pagi prefere jam en januaro

**NUR** al la konto :

**BE41 9795 3271 4810**

BIC : ARSPBE22

(banque: Argenta) de **Senlime**,  
25 rue Pierre Fluche,  
4800 VERVIERS, Belgio

## ENHAVO :

- p. 1: Editorial - Kapartikolo
- p. 2: Niaj programeroj lupee
- p. 3: Verviersa kalendaro 2018 (1/2)
- p. 4: Verviersa angulo (filmoj surtekstigitaj de E.G.V.)
- p. 5: Cinéma et espéranto (historique)
- p. 6: Kinarto kaj esperanto (historio)

Ce bulletin d'information étant principalement destiné à ceux de nos membres et sympathisants qui n'ont pas accès à internet, il nous semble utile de leur communiquer l'essentiel de ce qu'ils pourraient y trouver.

Ce numéro est un «spécial cinéma»: depuis des années, le groupe espérantiste de Verviers publie régulièrement des sous-titres en espéranto pour différents films (commerciaux) choisis en fonction de leur rapport avec la langue ou l'idéal espérantiste, de leur valeur représentative du cinéma belge ou appartenant incontestablement à ces films qui marquent l'histoire du cinéma.

Ces sous-titres sont regroupés sur le site internet de **Senlime** et vous en trouverez la liste actuelle en page 4, la page 5 vous donnant plus de détails sur le cinéma et l'espéranto.

Tiu-ĉi informilo ĉefe celanta tiujn el niaj membroj kaj simpatiantoj, kiu ne havas ret-aliron, ŝajnis utile komuniki al ili la kernon de tio kion ili povus tie trovi.

Tio-ĉi estas speciala numero pri kinarto: jam de multaj jaroj, la esperantista grupo de Verviers regule publikigas surtekstojn en esperanto por diversaj (komercaj) filmoj elektitaj pro ilia rilato kun la lingvo aŭ la idealo esperantista, ilia valoro kiel reprezentanto de la belga kinarto aŭ nekontesteble apartenantaj al tiu aro da filmoj kiuj signas la historion de la kinarto.

Tiuj surtekstoj estas arigitaj sur la ttt-ejo de **Senlime** kaj vi trovos la nunan liston en la paĝo 4, la paĝo 5 donante al vi pliajn detalojn pri kinarto kaj esperanto.

Jean-Marie Jacques



# Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncigitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

## Prelego pri libeloj

Libeloj oni nomas la flugantajn insektojn de la kelkaj 5000 specioj de la ordo odonatoj. Jam en paleozoiko flugadis super marĉejoj pralibeloj. Korpo de libelo konsistas el kapo, torako kaj postajeto.

La kapo de libelo havas du grandajn, okulfrapantajn okulojn, du malgrandajn antenojn kaj mordan buŝan aparaton. La okuloj konsistas el multaj unupartaj okuletoj.

La torako de libelo konsistas el tri segmentoj. El ĉiu segmento elkreskas unu paro de gamboj. La libelo havas du parojn de flugiloj, kiuj elkreskas el dua kaj tria torakaj segmentoj. Tiuj du torakaj segmentoj estas kunkresitaj. Ili tial formas tiel nomatan simtorakon. La simtorako staras rilate al la unua segmento oblikve. Tiam pozicion de torakaj segmentoj oni trovas ĉe neniu aliaj insektoj. Oblikva pozicio de simtorako kaŭzas, ke la flugiloj kompare al aliaj insektoj ne estas rekte super la gamboj.

La postajeto de libelo havas dek-unu segmentojn. La dua kaj tria segmentoj de postajeto de virseksulo portas falsajn seksajn organojn. Ekstremo de postajeto de virseksulo, la dek-unua segmento, portas eksternajn generilojn, preniletajn kopulaciajn organojn.

La libeloj flugas tre bone. Ili kapablas ne nur senmove sed eĉ dorsdirekten flugi.

**05-18** 20h00 Kelmis, Select: prelego pri la libeloj fare de Didier **Lousberg**.  
Inf. [lousberg@senlime.org](mailto:lousberg@senlime.org)

## Karaokeo de Senlime

Ja estas nun konate ke **Senlime** regule organizas sian propran karaoke-vesperon en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero ĝisrevidi fine de la lerneja jaro. Kelkajn himnojn ni ankaŭ kelkfoje kantas okaze de festoj kiel la Zamenhofa en decembro, k.t.p.

Karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaŭ havas grandan kulturalan valoron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (kaj tiele kulturon) enlande... kaj inverse.

Sed eĉ plie ni povas konatigi la esperantistan kulturon kaj lingvon al neesperantistoj. Tiel karaokeo fariĝas lingvo-instruilo.

Ĉi-jare (dec. 2017) forpasis la fama kantisto franclingva sed fakte belgdevena: Johnny **Hallyday**, kaj **Senlime** volis lin iom pli internacie konigi karaokeigante en esperanton unu el liaj plej belaj kanzonoj: vi eble rehejmeniros kantante "*Ĝis la senfino, mi vin petegas: retenu la nokton...*".

Se vi aliĝis/os al la yahoo-grupo «**Amikejo**» vi eĉ povas senpage elŝuti el ties dosiero «Fichiers» kelkajn el la karaokeoj kreitaj aŭ adaptitaj de **Senlime**, kaj rekte uzi ilin per via komputilo.

Venu kanti (kaj ridi) kun ni: kiel kutime vi rajtos laŭplaĉe elekti kelkajn kantojn el nia ĉiam pli kaj pli vasta kolekto.

**06-15** 20h00 BE-Kelmis, Select: karaokeo de **Senlime**.  
Inf. Jean-Marie **Jacques**  
[jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

## E-kurso per Tinĉjo

Ni son-registris esperanto-version de «Tinĉjo kaj la templo de l'suno» por esperanto-kurso de E.G.V. ĉe la klubo "Evasion" (maljunulara asocio de ENEO en Verviers). La komencantoj efektive bezonas ne nur libron (kaj instruistajn klarigojn) sed ankaŭ parol-ekzemplojn. Tiu sonregistrado estas pure pedagogia laboro: nenia kopio estos publikigita (respekte al la kopirajta leĝaro) kaj

la partoprenantoj de la kurso mem estos invititaj same ekzerciĝi per rolludado kaj fine sonregistrado de la sama verko.



La kurso okazos kiel pasintjare ĉiun ĵaŭdon (krom lernejaj ferioj) de la 9a ĝis la 11a horo ek de la 4a de oktobro en la iama biblioteko de la Minejoj [Les Minières], placo de la generalo Jacques en Verviers (ejo piede atingebla ek de la stacidomo kaj diversaj bus-haltejoj – aŭtomobila parkejo sur la placo).

**La kurso estas rezervita al membroj de ENEo, sed eblas membriĝi ek de la 50a jaraĝo!**

Prezo: 2 EUR hore (por Eneo) – kursmaterialo donacita de E.G.V.

**10-04** 09h00 - 11h00 Verviers, Biblioteko de la Minejoj, pl. Generalo Jacques:  
Esperanto-kurso por komencantoj  
Inf. Jean-Marie **Jacques**  
[jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

# ESPERANTO ★

## Verviersa kalendaro 2018



La grupo de Verviers publikigas ĉi-tie sian propran programon.

«*Trilandaj renkontiĝoj*» estu organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL)...

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programojn de aliaj lokaj grupoj sed ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro:

Jean-Marie Jacques  
([jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)).

**01-19** Vintra paŭzo: ni **NE** kunvenos.

**02-16** Vintra paŭzo: ni **NE** kunvenos.

**03-16** 20h00 Kelmis, Select: prelego de R. Demarche: "Retrovido al Esp-istaj agadoj". Inf. Raymond **Demarche**

**04-20** 20h00 Kelmis, Select: sonregistrado de lecionoj el **Tinĉjo k. la templo de l'suno**. Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**04-28** 20h00 Kelmis, Select: Grupa foriro de Tilff al la centra oficejo de UEA en Roterdamo. Inf. [viviane.mesanges@gmail.com](mailto:viviane.mesanges@gmail.com)

**05-18** 20h00 Kelmis, Select: prelego pri la libeloj fare de Didier Lousberg. Inf. [lousberg@senlime.org](mailto:lousberg@senlime.org)

**06-15** 20h00 Kelmis, Select: vespero karaokea de **Senlime**. Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**07-21** Somera paŭzo: ni **NE** kunvenos.

**07-28 ---> 08-04** Lisbono, 103-a Universala Kongreso de Esperanto.

**08-18** Somera paŭzo: ni **NE** kunvenos.

**09-21** Programo decidota.

**19-01** Pause hivernale: nous **NE** nous réunirons **PAS**.

**16-02** Pause hivernale: nous **NE** nous réunirons **PAS**.

**16-03** 20h00 Kelmis, Select: conférence de R. Demarche: "Rétrospective des activités espérantistes".

**20-04** 20h00 Kelmis, Select: enregistrement de leçons de **Tintin et le temple du soleil**. Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**28-04** 20h00 Kelmis, Select: départ groupé de Tilff vers le centre d'UEA à Rotterdam. Inf. [viviane.mesanges@gmail.com](mailto:viviane.mesanges@gmail.com)

**18-05** 20h00 Kelmis, Select: conférence sur les libellules par Didier Lousberg. Inf. [lousberg@senlime.org](mailto:lousberg@senlime.org)

**15-06** 20h00 Kelmis, Select: soirée karaoké de **Senlime**. Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**21-07** Pause d'été: nous **NE** nous réunirons **PAS**.

**28-07 ---> 04-08** Lisbonne, 103-e Congrès Universel d'Espéranto.

**18-08** Pause d'été: nous **NE** nous réunirons **PAS**.

**09-21** Programme à décider.

# Verviersa Angulo

## Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob  
19 Chemin de la Rostibouhaye  
4910 POLLEUR (THEUX)  
Tél. 087/22.10.79  
Trésorier: D. Lousberg  
25 Rue Pierre Fluche  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/22.20.30  
Secrétaire: J.M. Jacques  
5 Rue Joseph Wauters  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/33.02.92

## Ass. pour l'Espéranto (A.P.E.):

[www.esperanto-wallonie.be](http://www.esperanto-wallonie.be)  
Bernadette Poncelet, secrétaire  
103 rue Windt  
4850 PLOMBIERES  
Tél. 087/39.85.70  
[bernadetteponcelet@skynet.be](mailto:bernadetteponcelet@skynet.be)

## Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**BE41 9795 3271 4810**

BIC : ARSPBE22  
(banque: Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,  
4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information n'est plus intégré à la revue de APE «Espéranto en marche», qui a choisi de réduire sa taille...*

*La cotisation pour EGV-Senlime reste fixée à 10 Euros (ou 22 Euros si vous voulez un abonnement à cette revue sur papier).*

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant:**

**«cotisation de.... pour....»**

# Films sous-titrés en esperanto par le groupe de Verviers

Jen listo de la ĉefaj filmoj surtekstigitaj de la grupo de Verviers.  
Tiu surtekstoj disponeblas sur la ttt-ejo de Senlime:

Voici une liste des principaux films sous-titrés par le groupe de Verviers.  
Ces sous-titres sont disponibles sur le site de Senlime:

[http://www.senlime.be/\\_sgg/m4m7\\_1.htm](http://www.senlime.be/_sgg/m4m7_1.htm)

[Intolerance](#) (David Wark Griffith - 1916) - Maltoleremo  
[Metropolis](#) (Fritz Lang - 1927) - Metropolo  
[La Passion de Jeanne d'Arc](#) (Carl Theodor Dreyer - 1928)  
- La Pasiono de Johana de Arko  
[L'Atalante](#) (Jean Vigo - 1934) - L'Atalante (Le Chaland qui passe) - La Atalanto  
[Modern Times](#) (Charlie Chaplin - 1936) - La modernaj Tempoj  
[The great Dictator](#) (Charlie Chaplin - 1940) - La granda Diktatoro  
[Ugetsu monogatari](#) (Kenji Mizoguchi - 1953) - La Fabeloj de la luno postpluva  
[Lust for Life](#) (Vincenzo Minnelli - 1956) - La pasia vivo de Vincenzo Van Gogh  
[2001: A Space Odyssey](#) (Stanley Kubrick - 1968) - 2001: la spaca odiseado  
[Un soir... un train](#) (André Delvaux - 1968) - Iun Vesperon... trajno  
[Ryan's Daughter](#) (David Lean - 1970) - La filino de Rejan  
[Aguirre der Zorn Gottes](#) (Werner Herzog - 1972) - Aguirre, la kolero de Dio  
[Don Giovanni](#) (Joseph Losey - 1979) - Donjuano  
[Chariots of Fire](#) (Hugh Hudson - 1981) - La Ĉaroj el arda Fajro  
[La Guerre du feu](#) (Jean-Jacques Annaud - 1981) - La fajra milito  
[Le Maître de musique](#) (Gérard Corbiau - RTBF, K2 - 1988) - La muzika Majstro  
[Dances with Wolves](#) (Kevin Costner - 1990) - Dancas Kun La Lupoj  
[The Field](#) (Jim Sheridan - 1990) - La kampo  
[Tous les Matins du monde](#) (Alain Corneau - 1991) - Ĉiuj Matenoj de la mondo  
[La controverse de Valladolid](#) (Jean-Daniel Verhaeghe - Arte - 1991)  
- La kontraŭdiro Valadolida  
[Daens](#) (Stijn Coninx - 1992)  
[Le huitième Jour](#) (Jaco van Dormael - 1996) - La oka Tago  
[Brassed off](#) (Mark Herman - 1996) - La Virtuozoj  
[Rosetta](#) (Luc kaj Jean-Pierre Dardenne - 1999) - Rozeta  
[Captain Corelli](#) (John Madden - 2001) - Kapitano Corelli  
[Animatrix](#) (Andy kaj Larry Wachowski - 2003)  
[La jeune Fille à la perle](#) (Peter Webber - 2003) - La Junulino kun la perlo  
[Der Untergang](#) (Oliver Hirschbiegel - 2004) - La Falo  
[La Femme de Gilles](#) (Frédéric Fonteyne - 2004) - La Edzino de Ĝilo  
[Joyeux Noël](#) (Christian Carion - 2005-2006) - Ĝojan Kristnaskon  
[Eldorado](#) (Bouli Lanners - 2008)  
[Lemon Tree](#) (Eran Riklis - 2008) - La citronujoj  
[Des Hommes et des dieux](#) (Xavier Beauvois - 2010) - Homoj kaj dioj  
[Melancholia](#) (Lars von Trier - 2011) - Melankolia  
[La Désintégration](#) (Philippe Faucon - 2012) - La Malintegriĝo  
[Wakolda](#) (Lucia Puenzo - 2013) - La germana kuracisto  
[Timbuktu](#) (Abderrahmane Sissako - 2014)  
[Dunkirk](#) (Christopher Nolan - 2017) - Dunkirko

**Dans l'état actuel des choses, il faut toutefois être un peu compétent en informatique pour réunir sous-titres et film (la version correspondant aux sous-titres, généralement indiquée sur la page du film dans notre site, est à télécharger sur internet ou acheter en DVD, etc...).**

**La législation des différents pays ne nous permet malheureusement pas de diffuser nous-mêmes directement ces films avec nos sous-titres intégrés. C'est évidemment un frein puissant au développement du cinéma en espéranto.**

# Cinéma et espéranto (historique)

Quelques grands cinéastes, comme Laemmle et Chaplin, ont reconnu la valeur de l'espéranto pour le film parlé, surtout en raison de la grande clarté de la langue. Cependant, il n'a été procédé jusqu'à présent qu'à quelques essais. Le cinéma n'est certainement pas le champ d'application le plus cultivé pour l'application de la langue internationale à des besoins spécifiquement culturels.

En 1929 la "Paramount" produisit un très court film en espéranto, qui fut présenté lors du congrès d'Espéranto d'Amérique du Nord. En 1930 la même compagnie produisit un autre court-métrage à l'occasion du Congrès Universel à Oxford. En 1933, en liaison avec le rassemblement mondial scout à Godollo (Hongrie), a été produit un grand film "jamboréen" sonorisé, dans lequel on trouvait aussi une petite scène en Espéranto.

Le premier film complet en espéranto fut «Morgaŭ ni komencos la Vivon» [Demain nous commencerons la vie]. Produité à l'origine en allemand, on y ajouta ensuite une bande sonore en espéranto, sous la direction du célèbre écrivain et régisseur Jean Forge. Le film fut présenté d'abord en 1934 lors du Congrès Universel d'Espéranto à Stockholm et fut très bien accueilli.

Il est à noter que, dans le film mondialement célèbre de Chaplin «The Great Dictator» [Le grand Dictateur], toutes les enseignes des boutiques du ghetto juif sont en Espéranto. Un autre film américain assez important, qui utilisait la langue internationale, est «Idiot's Delight» [Jouissance d'un Idiot].

Le premier film de fiction complet tourné dans la langue internationale fut «Angoroj» [Angoisses], produit par J. L. Mahé à Paris. Il s'agit d'un film policier, dans lequel les rôles principaux sont tenus par les acteurs S. Flego, Marc Darnault et Jeanne Flego-Ravselj. Le film fut présenté en divers endroits, le plus grand nombre de fois lors du Troisième Festival d'Art International à Budapest (1966).

En 1966 la célèbre "Paramount" produisit la film «Incubus», dans lequel les dialogues sont en espéranto. Malheureusement les acteurs ne maîtrisent absolument pas la langue, de sorte que le film ne peut pas être regardé comme un succès de ce point de vue. Il a été projeté à l'occasion du 100e anniversaire du groupe espérantiste de Verviers dans cette même ville.

Suite au développement de la télévision, des cassettes-vidéo, DVD et ordinateurs, le cinéma connaît actuellement un nouveau succès et une nette démocratisation: presque n'importe qui peut non seulement regarder un film, mais même aussi – sinon en réaliser un, du moins – sous-titrer ses films préférés.

Ces dernières années, la presse a diffusé de plus en plus d'informations concernant l'Espéranto. De même, l'espéranto apparaît dans des films absolument sans rapport avec lui-même («Le grand Dictateur» fut le premier exemple, d'autres plus récents furent «Gattaca», «El coche de los pedales» et «Blade: Trinity 3»).

## La Verda Filmejo

Le site des films «verts» (<http://filmoj.net>), la plus grande collection de films à long terme en espéranto, est à la recherche de collaborateurs administrateurs et auteurs.

Le site des films «verts» est apparu il y a peu pour collecter des films avec des sous-titres, doublés ou créés à l'origine en espéranto.

Pendant ce temps, il est devenu extrêmement populaire parmi les espérantistes du monde entier, pendant 7 mois il a visité 7917 visiteurs uniques de 84 pays, qui ont vu 29346 pages.

Jusqu'à présent, 46 films ont été postés dans 22 genres, initialement parlés en 16 langues. Pourtant, 40 films attendent déjà leur apparition sur les pages des films «verts».

Deux sociétés détentrices de droits (une aux États-Unis et une en France) ont permis une traduction juridique de leurs films et ont promis de publier les traductions sur leurs sites Web plus tard, grâce aux performances des assistants et des administrateurs des films «verts».

La jeunesse espérantiste hollandaise et d'autres groupes organisés d'espérantistes en Russie, au Brésil et dans d'autres pays ont commencé à collaborer avec le site des films Verts afin de le mettre à jour avec de nouveaux films.

Un manuel de création et de traduction de sous-titres fournit des informations utiles pour chaque espérantiste qui veut traduire son film préféré et le donner à la communauté internationale.



# Kinaro kaj esperanto (historio)

Kelkaj grandaj filmfakuloj, ekzemple Laemmle kaj Chaplin, rekonis la valoron de Esperanto por la parolfilmo, precipe pro la granda klareco de la lingvo. Tamen, ĝis nun okazis nur kelkaj provoj. Kinematografio certe ne estas la plej vaste plugita kampo de aplikado de la Internacia Lingvo por specifaj kulturaj celoj.

En 1929 la filmkompanio "Paramount" produktis tute mallongan Esperantan filmon, kiu estis prezentita dum la Esperanto-kongreso de Norda Ameriko. En 1930 la sama kompanio produktis alian filmeton okaze de la UK de Esperanto en Oxford. En 1933, en ligo kun la Skolta Mondtendaro en Godollo (Hungario), estis produktita granda ĵamborea sonfilmo, en kiu troviĝis ankaŭ sceneto en Esperanto.

La unua plena sonfilmo en Esperanto estis «*Morgaŭ ni Komencos la Vivon*». Ĝi estis produktita originale en la germana lingvo kaj poste oni aldonis esperantlingvan parolon, sub la direktado de la konata verkisto kaj reĝisoro Jean Forge. La filmo estis unue prezentita en 1934 dum la UK de Esperanto en Stockholm kaj rikoltis tre bonan akcepton.

Estas menciinde, ke en la mondfama filmo de Chaplin «*La Granda Diktatoro*» ĉiuj surskriboj de la butikoj en la juda kvartalo estas en esperanto. Alia iom grava usona filma, kiu uzis la Internacian Lingvon, estas «*Idiot's Delight*» (Ĝuo de Idioto).

La unua fikcia filmo plene en la Internacia Lingvo estis «*Angoroj*», produktita de J. L. Mahé en Parizo. Temas pri kriminala filmo, en kiu la ĉefajn rolojn ludas geaktorj S. Flego, Marc Darnault kaj Jana Flego-Ravsely. La filmo estis prezentita en diversaj lokoj, plej multe dum la Tria Internacia Arta Festivalo en Budapeŝto (1966).

En 1966 la konata "Paramount" produktis la filmon «*Incubus*», en kiu la dialogoj estas en Esperanto. Bedaŭrinde la geaktorj tute ne regas la lingvon, tiel ke la filmo ne povas esti rigardata kiel sukcesa el tiu vidpunkto. Ĝi estis projekciita okaze de la 100a datreveno de la esperantista grupo de Verviers en tiu-ĉi sama urbo.

Sekve de la disvolviĝo de televido, video-kasedoj, lumdiskoj (DVD) kaj komputiloj, la kinaro nun konas novan sukceson kaj demokratiĝon: preskaŭ ĉiu povus nun ne nur spekti filmon, sed eĉ ankaŭ - se ne mem fari, almenaŭ - mem surskribigi siajn preferatajn filmojn.

Dum la lastaj jaroj, la gazetoj pli kaj pli sciigis diversajn informojn pri esperanto. Same esperanto foje aperas en filmo tute ne-esperantista («*La granda diktatoro*» estis la unua granda ekzemplo, aliaj pli freŝdataj estas «*Gattaca*», «*El coche de pedales*» kaj «*Blade: Trinity 3*»).

-0-0-0-

## La Verda Filmejo

La Verda Filmejo (<http://filmoj.net>), la plej granda kolekto de longdaŭraj filmoj en Esperanto, serĉas aŭtorojn kaj help-administrantojn.

La Verda Filmejo aperis antaŭ 7 monatoj dank' al REJM por kolekti filmojn kun subtekstoj, dublitaj aŭ originale kreitaj en Esperanto.

Dum tiu-ĉi tempo ĝi iĝis ekstreme populara inter esperantistoj el la tuta mondo, dum 7 monatoj ĝin vizitis 7917 unikaj vizitantoj el 84 landoj, kiuj rigardis 29346 paĝojn. Ĝis tiu-ĉi momento estis afiŝitaj 46 filmoj en 22 ĝenroj, originale parolataj en 16 lingvoj. Ankoraŭ 40 filmoj jam atendas sian aperon sur la paĝoj de Verda Filmejo.

Du rajtoposedantaj kompanioj (unu en Usono kaj unu en Francio) permesis laŭleĝan tradukon de siaj filmoj kaj promesis publikigi poste la tradukojn en siaj paĝaroj, tio dank' al agado de helpantoj kaj administrantoj de Verda Filmejo.

Nederlanda Esperanto-Junularo kaj aliaj organizitaj grupoj de esperantistoj en Rusio, Brazilo kaj aliaj landoj ekde la komenco kunlaboras kun Verda Filmejo por aktualigi ĝin per novaj filmoj.

La krea Subtekstejo, t.n. Manlibro pri kreado kaj tradukado de subtekstoj, unu el la partoj de Verda Filmejo, liveras utilajn informojn por ĉiu esperantisto, kiu volas traduki sian ŝatatan filmon kaj donaci ĝin al la internacia komunumo.

P.S. (al moderigantoj) Mi ne multigas informojn, tio estas nur alvoko.